



Kulturaj Kajeroj

E. MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

J A R A B O N O :

P. BABIN

Simpla : 7 fkoj / 13, boulevard de la Chauvinière

Bonfara : 12 fkoj / 44 - Nantes

P.C.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

JANUARO - FEBRUARO

1967

1

KULTURAJ KAJEROJ

1967

JANUARO - FEBRUARO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

ENHAVO

Plia omaĝo

J. Dedieu

Esperanto tra la mondo

A. Frangeul

Poetoj de la Loire-valo

S-ino Potin

Pri tekniko

Riĉaĵoj submaraj

D. Babin

Aliaj tempoj, aliaj moroj

Sro Fawler

Gravaj datrevenoj

Neĝo (1)

Pantovskij
trad. de R. Martin

Por via distro

Nia konkurso

P. Chevalier
Sro Salasc

Bonhumoro

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

PLIA OMAĜO

(Fino Jeanne Dedieu, kiu dum multaj jaroj partoprenis la poresperantan laboron de Henri Micard, sendis al ni la suban artikolon. Bedaŭrinde tiu artikolo atingis nin tro malfrue por aperi en la lasta speciala numero).

Kvankam la nomo de Henri Micard elvokas la internacie konatan Gresillon, tamen por la malnovaj esperantistoj en nia lando ĝi estas same ligita kun la esperantista instruista organizado G.E.E. Ambaŭ aferoj interrilatadis intimne, evoluis kune de komence ĝis la jaro 1957, kiam ili apartiĝis por laŭiri ĉiu la propran vojon. Dum tiu pli ol 20-jara periodo la subskribinto konstante kunlaboris kun S-ro Micard kaj bone scias pri liaj iniciatoj, persistemo, kapablo akiri helpon, firma kuraĝo kaj daŭra energio en la gvidado al difinita celo...

Por igi pli facila Esperanto-lernadon funkciis someraj kuroj en komuna restadloko iniciataj de nia kolego Honoré Bourguignon kaj destinitaj precipe al instruistoj. Unu, eĉ eble du, el tiuj renkontoj partoprenis S-ro Micard; kaj ekde 1935 li projektis similajn okazigi ne private sed sub kolektiva respondeco. Tiel naskiĝis en 1936 la asocio SOMERA LERNEJO, kies ĉefa tasko plenumita de ĝia sekretario S-ro Micard estis ĉiujare organizi unu somerlernejon. Li faris plensukcese. Por ekterni Esperanton aŭ sia ekzerco en lingvopraktiko partoprenis instruistoj venintaj solaj aŭ kun la familio por kune pasigi someran libertempon. Kiel ĝuinda estis la marbordo aŭ la montaro, ĉe Mediteraneo aŭ Atlantiko, ĉe Alpoj aŭ alia monteceno!

Impulse de ĝia sekretario la Somera Lernejo tre baldaŭ poste evoluis; ĝi unuiĝis al pli malnova instruista E-asocio fondita de Charles Despeyroux. Per tiu kunfandiĝo estiĝis G.E.E. kun S-roj Micard kaj Despeyroux respektive sekretario kaj honorprezidanto. Ĉi monata bulteno estis longatempе « Esperanto-Lernejo ».

Eksplozidis la milito. Maltris ĉiu entrepreno sed ne volonte ĉesos la entreprenemo de S-ro Micard. En la aprilo n. de E.L. printempe de 1940 li anoncas pri esperebla okazigo de somerlernejo en... lia vilaĝo Epineux-le-Séguin, « iu ĉefurbo de 323 enloĝantoj! ». Li estis surloke por ĉion organizi kaj klopodi por doni al ĉiu la eblecon pasigi la tempon tiel agreble kiel obligas la cirkonstancoj.

Malobligaj estis la cirkonstancoj, la projekto ne povis efektiviĝi. Cetero iom poste nia sekretario estis senoficigita instruisto kaj S-ro Micard ricevis postenon en malproksima urbo Nantes, kien sekvis ŝin la tuta familio. Necesis sin provizi en kamparo. Tien vojaĝis urboanoj. Ofte mankis publikaj transportrimedoj; preferi kaj foje eĉ pli sekure estis veturi individue. Tion faras S-ro Micard. Sed ne facile. Pro iama, tre malnova krurakcidento li ja ne povas bicikli. Sed de la volo la ordono pli efikas ol maŝino. Li elturniĝas kaj eĉ longdistancan li vojaĝas en maniero tute eksterkutima; li sidas sur la invalido-ĉareto kaj ĝin movas per la brakoj. Mirinda kaj admirinda energio!

Finiĝis la milito. Inter esperantistoj forte blovis vento al interesacia unuigo. S-ro Micard energie bataladis por ĝin realigi. La 1-an de Aprilo 1945 en Paris estiĝis G.E.E., kiel fasko en la landan asocion de U.E.A. Sed post kelkaj jaroj montriĝadis evidente ke restas granda spaco inter deziro kaj akiro... Ni devis konstati ke ne eblas kunlabori kaj S-ro Micard, kiu jam forĝis la unuiĝon samenergie ad-

monis al rompo; lin aprobis eksterordinara kongreso; ek-siĝis G.E.E., denove memstara; daŭre gvidata de estraro bonvole akceptanta la fortan influvopon kaj la karakterizan personecon de la sekretario.

Liaj grandaj zorgoj kaj ŝato ĉiam estis la somerlernejo; li klopodis ĝin restarigi senprokraste, kiam ankoraŭ efikas en la socia vivo la sekvoj de finiĝinta milito. En 1945 ne multe gravis restadeja agrablo plej gravis la rekon-taktiĝo mem kaj por Esperanto la laboro. Li penis trovi lokon. Malfacile. Ni kunvenis en centrokcidenta urbo Sablé. Poste ĉiujare li devis fronti al la samaj problemoj de organizado. Viziti urbon eĉ urbojn por elekti lokon, kon-taktiĝi kun urbestro por peti permeson uzi lernejon, pri-trakti kun hoteloj aŭ agentejoj por certigi ĉiun partopre-nonton pri la ebleco trovi gastejon laŭ ŝato kaj mono estis lia grava tasko. Tasko fariĝinta de jaro al jaro pli kaj pli malagable malfacila precipe pro la rifuzemo de lernejes-troj kies konsento pri lernejujo estis nepre necesa.

Foje, en 1946, pro fiasko de du sinsekve planitaj aranĝoj regis ankoraŭ en Majo plena necertejo pri aŭgus-ta somerlernejo. Finfine reduktita al du anstataŭ la tri kutimaj semajnoj ĝi povis malfrue okazi en Sassenage. Alifoje S-ro Micard ne trovis eblecon por memstara somer-lernejo; li ĝin kunigis al sia ŝtago de Popola Edukado, kiu pestulis partoprenon en sia programo. Ŝajnas ke ju pli kres-kis malfacilo despli sentiĝis la bezono pri sukceso. Perle-tere oni laŭdis pri la somerlernejoj. Sed kial ne okazas du eĉ tri diversdate? Kial? Car G.E.E. ne disponas pri pro-pria ejo, kie ni povus laŭplaĉe organizi ne nur somerlerne-jon sed ankaŭ seminarion, ŝtagojn, kongresojn. Se ni havus propran ejon! Bona ideo. Al 150 elektitaj adresoj de sa-mideanoj S-ro Micard sendas cirkuleron: se 600 espe-rantistoj pruntedonos po 10.000 frankoj ni povus ak'ri ejon kaj forigi malfacilon en organizado de somerlernejoj. Li ricevis aprobojn kaj proponojn, fondis kooperativon, kiu fine de 1951 aĉetis bienon Grésillon.

Kiel feliĉa li estas anoncante, ke monhelpis 190 es-perantistoj kaj jam pagita estas la kastelo. Sed ĝi estas malplena. Por ĝin provizi per ĉio bezonata necesas daŭrigi le pruntadon. Li alvokas por novaj sumoj. Ankaŭ por man-laboro. Li nutras entuziasmon; je lia dispono estiĝas ser-voj de metiistoj aŭ oficioj, instruistoj, intelektuloj, ĉiuj pri manlaboro lertaj. Kaj jen la akvo flua en la domojn. Jen donacoj: ŝrankego, spegulo, ktp. Volontuloj prizor-gas basenon en la parko. La 2-an de Junio, festa esto! Oni primitis la tablojn. Festenas 92 personoj. En Julio alvenis eksterlandanoj kaj enlandanoj por la Internacia Kultura Semajno de I.L.E.I. Tie ankaŭ gastis en Aŭgusto la somerlernejo de G.E.E. kiu finfine disponis pri ejo ba-zonata unuocela kaj unuarange al ĝi destinita. Feliĉaj estis ĉiuj, feliĉega estis S-ro Micard. Plenrajte. Homo kun forta personeco, granda laborkapablo, nelacigebla agemo, per-sista aktiveco kaj nekontesteble riĉa je stimula influvopo, homo meritplena, kreinto per granda oferado de tempo kaj energio, li certe indus je profunde sincera dankemo de la esperantistoj. Sed ili mediti pri lia iminda ekzemp-lo. Ne nur mediti sed, honore al li, konsekvence agi.

Jeanne DEDIEU,
prezidantino de G.E.E.

Esperanto tra la Mondo



El Tel-Aviv.

— La Israela Ministerio pri Poŝtaj aferoj decidis eldoni specialan memorigan poŝtmarkon kun Esperanta teksto okaze de la 52-a Universala Kongreso de Esperanto. Jam eldonis poŝtmarkojn kun teksto en la Internacia Lingvo : Aŭstrujo, Brazilo, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Jugoslavio, Polujo kaj Soveta Unio.

Someraj renkontiĝoj.

— Pro la malproksimeco de la Universala Kongreso, en Tel-Aviv, Eŭropa esperanto kongreso ankaŭ okazos inter la 23-a de julio kaj la 30-a, en Innsbruck (Aŭstrujo). Konstanta adreso : Aŭstria esperantista federacio Fünfhausgasse 16, A - 1150, Wien (Aŭstrujo).

— Junulara esperantista franca organizo (JEFO) invitas la ĝejnulojn al sia renkontiĝo en la Kulturdomo Grésillon (23-27 marto). Adreso : JEFO 34, rue de Chabrol, Paris-10^e.

— 40a SAT kongreso : en Malmö (Svedujo), 29 julio-5 aŭgusto. Adreso : K-ino Elsa Johansson, Varnhemsgatan 2 A III, Malmö.

— Junulara konferenco, en Enkhuizen, 19-26 aŭgusto, pri la temo « Miljara lukto kontraŭ la maro ». Adreso : N EJ, p/a Sro Wim Jansen, Röntgenstraat 32a, Vlaardingen, Nederlando.

— Internacia turisma kunveno de junaj esperantistoj, en Bydgoszcz (Pollando), 20-28 aŭgusto. Post ĝi okazos 10-taga ekskurso tra nordorienta Polujo. Adreso : A. Grzebowski, Curie-Skłodowskiej 10/1, Bydgoszcz 9.

— Somera esperanto universitato, 8-15 julio en Gyula (Hungario). Adreso : Somera esperanto universitato ; Petöfi-ter 3, Gyula.

— Por restadoj en la somera vilaĝo de Primošten, ĉe la Adriatika Maro, Jugoslavio, skribu al : « Internacia Esperanto-Somerumejo », Primošten, kod. Šibenika, Jugoslavio.

— Vi povas, en favoraj kondiĉoj, restadi en la montedomo « Esperanto », sur monto Vitoša, apud Sofia. Bulgara esperanto-asocio, poŝtkodo 66, Sofia, Bulvaro Hr. Botev 97, Bulgario).

— En Calais, 12-15 majo, okazos samtempe la nacia kongreso de francaj esperantistoj kaj la « markola kongreso » por angloj, belgoj, nederlandoj.

— Katolikaj kaj protestantaj esperantistoj havos por la unua fojo komunan internacian kongreson en 1968. Ĝi okazos en Limburg/Lahn, en Germanujo.

Pri multlingvaj konferencoj.

Laŭ lastatempaj dokumentoj de Unuigintaj Nacioj, internacia konferenco pri juraj aspektoj de traktatoj (internaciaj kontraktoj) kostos ĉ. 300.000 dolarojn jam nur por interpretado kaj tradukado. La Somera Sesio de la Ekonomika kaj Socia Konsilantaro de U.N. en 1965 kostis « preskaŭ duono de miliono da dolaroj nur por la tradukado ».

Estas interese noti ke dum la lasta ĝenerala Konferenco de U.N.E.S.C.O., oni enkondukis, por la estonteco, ankaŭ la araban, kiel laboran lingvon. Nun U.N.E.S.C.O. havas 8 oficialajn lingvojn el kiuj 5 estos laboraj lingvoj ! Pri tiuj faktoj, la januara numero de « Esperanto » liveras multajn informojn nepre uzindajn de la esperantistoj por propaganda agado.

« Ruĝa kruco ».

Rondeto de ruĝkrucaĵoj fondiĝis. Rilatu kun Dro Josef Hradil, ĉesky Dub 137/III, okres Liberec, Ĉeĥoslovakio.

En universitato.

Trijara oficiala kurso de Esperanto komenĉiĝis en la katedro de ĝenerala lingvistiko de la Sciencuniversitato Lorand Eotvos en Budapeŝto. Dek tri 3a-jaraj studentoj elektis studi la Internacian Lingvon ses horojn semajne. Fininte la kurson sukcese, ĉiu ricevos diplomon kun la indiko, kiel tria fako, « mezlerneja instruisto de Esperanto, lingvo kaj literaturo ».

Radio elsendoj.

La eksperimentaj elsendoj de B.B.C. en la Internacia Lingvo Esperanto, kiuj laŭplane devis finiĝi en decembro 1966, pludaŭros almenaŭ ĝis marto de la nuna jaro. La informo koincidas kun la novaĵo, ke Radio Praha decidis rekomenci elsendadon en Esperanto. La britaj elsendoj estas direktitaj al Orienta Eŭropo kaj estas aŭdeblaj la lastan jaŭdon de la monato, je 21 h. 30. GMT, en la ondozonoj 49 ; 41 kaj 31 m.

Se vi ekskursas ĉirkaŭ nia kulturdomo.

« Syndicat d'initiative » de Angers, je 40 km. de la kastelo de Grésillon, aldonis esperantlingvan suplementon al la loka ilustrita turisma faldfolio de la urbo. Petu tiun esperanto-eldonaĵon rekte al : Syndicat d'initiative 49 Angers, Francujo.

Grandaj poetoj de la Loire valo

BEDAŬROJ (J. du Bellay)

*Feliĉa sorto, kiel « Ulysse » multvojaĝa
Aŭ kiel konkerinto de la ŝaflano ora
Reveni, fine, hejmen, kaj dum vivresto glora
Inter parencoj, vivi pli sperta, kaj pli saĝa.*

*Ve, kiam fumon vian, kameno hejmvilaĝa,
Mi vidos gaje fumi, en kiu tempo jora
Mi vidos vin, dometo, kaj korto, pli valora
Al mi ol tuta reĝa provinco riĉpejzaĝa.*

*Pli plaĉas al mi mia prapatra domo paca
Ol de palacoj romaj la frunto plej aŭdaca
Pli ol marmoro dura l'ardezo fajne blua.*

*Pli mia « Loire » galla, ol la Tiber'latina
Pli mia « Liré » eta, ol Monto Palatina
Pli ol marvento sala, la dolĉa mild' « Anjoua ».*

Tradukita de Kalocsay.

En la 15a j.e. la Valo de la Loire baldaŭ fariĝis « Reĝa Vojo » de Sully (oriente) ĝis Angers la kasteloj ekaperis aŭ renaskiĝis el ruinoj, pli beligitaj per ĝardenoj de Franca stilo.

Post la drastaj mezepokaj jaroj ekaperis, en dolĉa klimato, kvazaŭ Arto de la Vivo, delikateco de la moroj kaj de la ideoj, eleganteco de la stilo kaj ĝenerala intereso pri ĉiuj belaĵoj. La reĝoj, la princoj, la poetoj, alkuris kaj oni ne forgesu la allogojn de tiom da ĉarmaj kaj famaj virinoj, kiuj plibeligis kaj pli riĉigis la tiean vivon.

Dum pli ol du cent jaroj la Valo de la Loire fariĝis la « lulili de Francio », kaj ankaŭ de la franca pentrarto.

Anĵua Grafo konata sub la nomo « Bona Reĝo René » naskiĝis en 1408 en la Kastelo de Angers. Li estis samtempe princo, poeto kaj ankaŭ princo de la novnaskita franca lingvo. Poste li forlasis la Loire bordon por tiu de la rivero Rhône. Tamen li antaŭe kreis en Angers kortegon ĉiam malfermitan al la poetoj kaj al ĉiuj artistoj. Fakte li havis pli da inklino por la artoj kaj la beletroj ol por la politikaj sukcesoj aŭ la kuraĝaj bataloj.

La kortego multe evoluis de post la kruelaj aŭdacoj de Foulques Nerra. Ĝi fariĝis intelekta centro de provinco, kies abatejoj kaj kasteloj konsistis tiom multe da fontoj pri erudicio kaj poezio.

René tutkore amis Angers, kaj daŭre zorgis pri la feliĉo de la popolo. Li ne nur estis la Patrono de Sciencoj, beletroj kaj artoj sed li interesiĝis pri la agrokulturo kaj la florkulturo. Tiu princo poeto kaj konstruisto estis ankaŭ feliĉa kaj fidela edzo. Lia unua edzino mortis. Li reedziĝis kun Jeanne de Laval kaj ili ambaŭ vivis feliĉe kaj simple en etoso harmonia.

Pri almenaŭ du el la tiamaj verkistoj oni ne povas silenti. Ili pli riĉigis la belestristikan trezoron de Francujo : Pierre de Ronsard, poeto de amemaj koroj, kantoro de sia bela regiono kaj de la Anĵua mildeco, naskiĝis en la jaro 1524 en la Kastelo « la Possonière » apud la urbo Vendôme. Li multe vojaĝis. En 1537 li sekvis en Skotlando, kiel paĝo, la filinon de Reĝo François la Unua de Francio, poste li restadis en Nederlando kaj revenis en Francion por dediĉi sian vivon al grava poezia verkaro.

Dum sep jaroj li ĝisfunde studatis la grekajn, latinajn kaj italajn poetojn. Laŭ Greka modelo, li fondis kun siaj samfakanoj grupon konatan per la nomo « Pléiade ». Ili intencis alte famigi la poezion kaj poluri la ĝis tiam iom anarkie evoluintan lingvon francan.

Ronsard ĝuis grandan favoron ĉe la kortego. Poste li retiriĝis en abatejo apud Tours, sed li daŭre zorgis pri siaj rilatoj en Parizo. Tamen li revenis en sia amata provinco por morti en 1585.

Joachim du Bellay naskiĝis en la jaro 1522 en la Kastelo « La Turmelière », ĉe la Loire bordo, proksime al la vilaĝo Liré.


Kvankam li ne estis riĉa, li studis ĵuron kaj literaturon en la Fakultato de Poitiers.

En aŭtuno de 1547 Ronsard renkontis en gastejo tiun junan rajdanton, kelkajn jarojn pli aĝa ol li mem. Kun surprizo li malkovris samtempe parencon kaj najbaron. Tamen ilia komuna altiro al poezio igis ilin pli proksimaj ol aliaj naturaj ligiloj. Ili ambaŭ decidis kunlabori por pliperfektigi la nacian lingvon : do ili kune verkis la grupo « la Pléiade ».

Cirkaŭ la jaro 1549 kverelo de artistoj endanĝerigis la profundan amikecon de la du poetoj, kiam du Bellay provis utiligi la inspiron de Ronsard por persona profito.

Post malfeliĉa restado en Romo ĉe sia onklo, Kardinalo Jean du Bellay, Joachim revenis hejmen en 1557. Li subite mortis en 1560.

La infanaĝo de Joachim lasis al li profundan



senton de vane perdita tempo. Kiel orfo li estis edukita de frato sen intelekta valoro. Joachim esprimis tion en versaĵo pri sia juneco : « ...ĝi estis perdita, kiel en verda ĝardeno la floro, kiun neniu ondo akvigas, kiun neniu mano kulturas ! ».


Post la morto de la frato, li devis zorgi pri sia nevo kaj barakti por gajni procesojn pri la heredaĵo.

Baldaŭ la malsano eniris la domon kaj enlitis la poeton. Do, li komencis legi kaj studi la verkojn de la latinaj kaj grekaj poetoj.

Post lia morto en 1560, Ronsard funebriis pri la malapero de sia kunulo. Li restis sola Patrono de « la Pléiade ».

Tamen du Bellay kvankam malsana, malriĉa, donacis al sia patrujo faman nomon, inter la plej gravaj en la franca poezio.

Sino POTIN.



MORGAŬA VETURADO

Tiu fluganta maŝino estas unu el la du « aŭtogiroj » prezentitaj en la Pariza Ekspozicio de Amatoraj Laboraĵoj. Ĝi estis konstruita de du francaj inĝenieroj Jacques Rigault kaj Maurice Deproux kaj de piloto de « Bœing », Jacques Caillat. La aŭtogiro indifereblas pri strat-embarasoj ; facile direktebla ĝi atingas rapidecon de 159 km.-h.

RIĈAĴOJ SUBMARAJ

En 1961 la radio-aŭskultantoj aŭdis la jenan novaĵon : « La platformo « Ocean Driller » rompis siajn kablojn kaŭze de la uragano Hilda en la Meksikia Golfo ». Tiajn novaĵojn oni ofte aŭdis de post tiu dato kaj tiuj okazaĵoj montras la malfacilaĵojn spertitajn de la ankoraŭ nova tekniko de submara serĉado kaj ekspluatado de petrolo. De pluraj jaroj, turoj (derikoj) starantaj sur platformoj aperas kelkajn kilometrojn for de la bordoj de Norda Ameriko, Afriko, Aŭstralio, Francujo kaj en la Norda Maro. Oni povas fari al si la demandon : « Kial oni tiom interesigas pri tiaj serĉadoj kvankam ili tiom multe kostas kaj renkontas malfacilaĵojn ? ».

La unua respondo estas : oni pli kaj pli bezonas energion ; la konsumado de energio duobligis de post 1950 kaj la petrolkonsumado kreskis de 36 % ĝis 50 % de la tuta konsumado en la sama tempo. Dum la venontaj dekkvin jaroj la konsumado de petrolo kreskos ĝis 60 % de la tuta energikonsumado, kiu mem duobligos.

La dua respondo estas : oceanoj kaj maroj kovras du trionojn de la globo-surfaco ; 28 milionoj da kvadrataj kilometroj (la trioblo de la surfaco de Usono) kuŝas malpli ol 200 metrojn sub la surfaco de la maro ; konsekvence la ekspluatebloj de la oceana subgrundo estas grandegaj.

Tria respondo : novaj teknikoj, pli kaj pli progresantaj, ebligas nun tiun serĉadon.

Oni ĝin praktikas sur « la kontinenta plataĵo », t.e. la iom dekliva plataĵo kiu plilongigas la « elakviĝa grundo ». Tiu plataĵo estas pli malpli vasta laŭ la bordoj ; malvasta laŭlonge de la Afrika marbordo ĝi preskaŭ tute okupas la Ĉanelon, la Nordan Maron kaj la Baltan Maron. Ĝia surfaco estis precize difinita per la Genevaj Akordoj en 1958, kaj ankaŭ ĝiaj limoj inter la ŝtatoj.

Por la petrol-serĉanto la kriterioj ne estas la samaj. La plej grava elemento estas kompreneble la profundo, sed ankaŭ gravas la meteorologiaj kondiĉoj (ventoj), la oceanografiaj kondiĉoj (tajdoj kaj akvoŭfluo), la konsisto de la fundo kaj la distanco ĝis la bordo. Pro la diverseco de tiuj kriterioj, ĉiu kazo postulas originalan solvon ; tial la platformoj estas tre diversspecaj.

Antaŭ ol establi platformon estas necese fari esplorojn laŭ du precipaj procedoj : unue la magnetometrio (mezuro de la magnetaj anomalioj) estas praktikata de aviadilo : rapida, malmultekosta sed ne tre preciza procedo, kiu tamen ebligas la eliminon de vastaj regionoj ; due la sisma esplorado estas pli utiligita : ĝi konsistas en kreado, per eksplodigo de malgrandaj ŝarĝoj, de kolizi-ondoj kaptitaj post resendo fare de la rokoj ; fakte temas pri vera radiografio de la grundo. Dank'al tiuj esploroj estas eble establi platformojn kun favoraj perspektivoj.

La platformoj estas tri specaj :

la fiksaj platformoj tiaj, kiajn oni jam starigis en 1920 en la kvietaj malprofundaj akvoj de malgrandaj lagoj en Luiziano ;

la moveblaj platformoj sin apogantaj sur la fundo kiuj ĉe la komenco konsistis nur en pontonoj sur kiuj oni starigis la borstangojn kaj poste subakvigis ; la ferdeko staris en la maro. Por pli profundaj akvoj oni konstruis « submergeblajn platformojn » ; kasonoj portas la labor-platformon ; post trenado al la elektita loko, tiuj kasonoj estas plenigitaj per akvo ĝis ili kuŝas sur la fundo. Tiaj platformoj estas kelkafoje grandegaj.

La plej uzata estas nun la platformo « sinstariga ». Ĝi estas portita de metalaj « gamboj », kies longeco estas variigebla

per dentostangoj. Post transportado ĝis la labor-loko oni prilongigas tujn gambojn ĝis ili apogas sin sur la fundo kaj iom pli por ke la platformo kuŝu io msuper la ondoj. Tiaj instalaĵoj pezas ĝis 6 500 tunojn kun « gamboj » 140 metrojn altaj :


la glosantaj instalaĵoj estas kompreneble la plej simplaj. La deriko staras jen en la centro de la ŝipo, jen sur la bordo de ŝipo stabiligita. Tiaj instalaĵoj estas facile kaj rapide translokigeblaj kaj konsekvence memstaraj, sed danĝeraj okaze de ventegoj. Por malgravigi tiun mankon de stabilo, oni kreis « duon-submergeblajn » platformojn. Ili konsistas ell vertikalaj flosiloj kunligitaj per horizontalaj flosiloj. Kiam tiuj flosiloj estas parte subakvigitaj ili ne estas submetitaj je la ondoforto. Per tiaj instalaĵoj oni povas bori ĝis pli ol 200 metra profundeco.

La ĉefa problemo koncerne tiajn platformojn estas la lokigo ne ebla per la kutimaj rimedoj (ankroj) pro la tro granda profundeco. Oni utiligas facilegan kaj rapide munteblan elektronikan sistemon : signaloj estas senditaj de diversaj fiksj punktoj situantaj sur la fundo, kaj kaptitaj per aparato lokita sur la platformo, kiu reĝustigas la situon agante sur la helicoj.

En tiaj entreprenoj estas necese labori senhalte. La laboristaro (40 ĝis 60 laboristoj) vaĉe laboras (t. e. en kvar taĉmentoj) kaj restas sur la platformo dum tri sinsekvaj semajnoj. La pli granda nombro el tiuj platformoj havas surterigejon por helikopteroj.

Ĉu la romanoj de Jules Verne estis multe antaŭtempaj ? Kapitano Nemo malkovris perlojn tiel dikajn, kiel kokosnuksoj kaj orplenaĵojn, 20 000 leŭgojn sub la maro. Niaj modernaj subakvaj esploristoj malkovros multe pli grandajn riĉaĵojn.

DOMINIQUE BABIN.



Vi deziras viziti Grésillon ?

TUJ REZERVU VIAN ĈAMBRON

ALIAJ TEMPOJ,

ALIAJ MOROJ

Hodiaŭ ni iros, se vi bonvolas, en la Anglujo de la dedoka jarcento por konatigi kun iama loĝanto de « Clapham », antaŭurbo de Londono. Tiu estis Granville Scharp, kies vivo estas bela specimeno de la povo de individua strebo kaj de individua nevenkebleco. Lia entuziasmo kvazaŭ infektis tiun tutan aron de Claphamanoj kiuj kontraŭbatalis la sklavecon.

Dum li okupis tute ne altrangan oficon, li komencis dediĉi siajn tute ne multajn liberajn horojn al la laboro de la liberigo de la nigraj sklavoj. (Parenteze, li estis ĉiam tre laborema). Ekzemple, dum li estis metilernanto, li argumentis pri religiaj aferoj kun kolego kiu estis Unitarano. Tiu kolego volis konviki Scharp, ke lia kredo pri Sankta Triuno fontis el lia nekapablo bone kompreni la signifon de la originala greklingva nova testamento. Do, Scharp lernis la grekan lingvon por provi ĉu li pravas. Pro alia diskuto, ĉifoje kun judo, li lernis la hebrean lingvon, por povi kompreni la malnovan testamenton. Mi devas aldoni ke, poste, liaj lingvaj studoj ebligis al li eldoni hipotezon pri la greka gramatiko, kiun oni konas per la nomo de la leĝo de Scharp. Tamen, tiuj studoj tute ne elĉerpis lian energion. Liaj ĉefaj vivceloj kreskis el lia sindonemo kaj bonvolemo. Li havis fraton, kies nomo estis Wilhelmo. Wilhelmo Scharp estis kuracisto, kaj kutimis kuraci malriĉulojn, lun tagon, venis peti lian helpon kompatinda Afrikano, kies nomo estis Jonathan Strong. Tiu vere ŝajnis proksime al la morto La krueleco de lia mastro preskaŭ mortigis lin. Tiu mastro estis leĝisto el Bardabos kiu venis al Londono kun tiu sklavoj. Pro lia stato, la mastro kiu nun taksis lin kiel senvoloraĵon elpelis lin sur la stratojn de Londono, por tie morti. La kompatindulo — nur pakajo el doloroj — sukcesis mizere vivi kiel almozpetanto, ĝis li renkontis Wilhelmo Scharp. Tiu iomete kuracis

lin kaj trovis par li liton en hospitalo, kie li ne nur kuraciĝis, sed ankaŭ saniĝis. La du fratoj Scharp, poste, mone subtenis la negron por savi lin de la vivo de surstrata almozpetanto. Ili eĉ trovis por li postenon ĉe apotekisto. Lun tagon, deorante kiel lakeo, li akompanis la edzinon de sia mastro dum promenado en kaleŝo. Laŭ la tiutempa kutimo, li staris sur la ekstera, malantaŭ parto de la veturilo. Ve ! Dum li tie staris, la leĝisto el Bardabos, lia antaŭa mastro, vidis lin, rekonis sian antaŭan sklavon, kaj rimarkis ke li estas nun sana kaj forta, do altvalora posedaĵo. Kaj tiun posedaĵon li decidis rehavi. Li do arestigis la negron de du oficistoj de la Lordo Urbestro. Oni loĝigis lin en karcero por atendi ŝipon kaj reporti lin al Bardabos. Nu, tiu negro, en karcero, pensis pri Granville Scharp kaj sendis al li leteron por peti lian helpon. Scharp mem iris al la malliberejo kaj formale deklaris al la ĉefo de la karcero, ke se li liveros Jonathan Strong al iu persono ajn, li tion faros je lia propra risko... ĝis la malliberigito havos la juĝan decidon de la Lordo Urbestro de Londono ! Al tiu altranga oficisto, Scharp tuj iris, kaj li akiris de li juĝan alvokon kontraŭ tiuj personoj kiuj arestis Jonathan Strong sen oficiala arestletero. La proceso venis sed, dume, oni eksciis, ke la mastro de la negro jam vendis lin al nova mastro. Tiu sinjoro montris la vendateston kaj pretendis, ke li rajtas ricevi posedon de sia propraĵo. Tiutempe (t.e. en la jaro 1767), kvankam la persona libero de anglo estis teorie tre alte taksita, praktike la afero estis iom dubinda : La perforta kaptado de maristoj per la tiel nomita « press-gangs » por trovi anarojn por la militŝipoj estis permesita de la leĝo. Ankaŭ por la servo de la East India Company, oni regule dungis arojn de homŝtelistoj en Londono kaj aliaj gravaj urboj. Kaj en la londonaj ĵurnaloj, kiel en tiuj de Liverpool oni ĉiutage eldonis publike proponojn de premioj por la rekaptado de forkurintaj sklavoj. Do, la leĝa pozicio de sklavoj en

Anglujo estis ne klara. La juĝaj decidoj pri tio kontraŭdiris unu la alian. La leĝistoj, kiujn dungis Granville Scharp por defendi lin en la proceso pri Jonathan Strong male opiniis al li, kaj la posedanto de Jonathan Strong avertis Scharp, ke la ĉefjuĝisto de Anglujo, la fama Lordo Mansfield mem, opiniis ke sklavo per la nura fakto ke li alvenis Anglujon ne estiĝas libera homo. Sekve, li diris, ke la posedanto rajtas postuli pere de nova proceso revenon de sklavo al siaj plan-tejoj. Tiaj informoj sufiĉus por malesperigi ordinaran homon. Tamen ne Granville Scharp. Kontraŭe, ĝi nur instigis lin batali por la libero de Jonathan Strong kaj de ĉiuj negroj, almenaŭ en Anglujo. Pro manko de sperta, leĝista helpo li nepre devis fari senesperan provon defendi sin mem. Dum la tuta vivo, ĝis tiam, li neniam eĉ malfermis libron pri leĝo, tamen nun li devas nepre entrepreni, kvankam tre kontraŭvole, la serĉadon tra la indeksoj de jurbiblioteko. Kaj oni ne devas forgesi, ke samtempe Granville Scharp estis plene okupita per sia dumtaga laboro. Li devis do sekvi siajn novajn studojn malfrue en la nokto aŭ fruege en la mateno. Li konfesis, ke li mem estiĝis speco de sklavo - Li oferis sian ĉiun liberan momenton dum du jaroj por detale studi la anglan leĝon pri persona libero. Jen pezega laboro! Tiun li akceptis fari sen instruanto, sen konsilanto, eĉ sen granda espero. Li sukcesis trovi nek unu solan juriston, kies opinio favoris lian entreprenon. La rezultoj de liaj enketoj troviĝis tamen tiom kontentigaj al si mem kiom surprizaj al la juristaro. « Dank'al Dio, li skribis, ke troviĝas en la angla leĝaro — almenaŭ laŭ mia eltrovo — nenio kiu pravigas la sklavigon de aliaj homoj ». Nun, li staris firme, nun li nenion dubis. Li verkis sumi-

gadon de la rezultoj de siaj studoj. Ĉi estis klara, vireca klarigo, sub titolo : « Pri la maljusto de la tolerado de sklaveco en Anglujo ». Li mem faris multajn kopiojn de tiu pamfleto kaj cirkuligis ilin inter la plej eminentaj juristoj. La posedanto de Strong, kiu nun komprenis la specon de viro, kiu kontraŭas lin elpensis diversajn pretekstojn por prokrasti lian proceson kontraŭ Scharp. Fine, li proponis kompromision. Tion kompreneble, Scharp rifuzis. Li daŭre rondirigis siajn manskribitajn traktaĵojn. La rezulto estis, ke la plendanto, la tiel nomita posedanto devis pagi trioblajn kostojn de proceso pro manko de persekuti sian plendon. La traktaĵo de Scharp presiĝis en la jaro 1769. Dumtempe, okazis aliaj perfortaj kaptadoj de negroj en Londono kaj forsendo de ĉiuj malfeliĉuloj al la karibeaj insuloj por vendado. Kiam ajn li povis trovi tian okazon, Scharp tuj procesis pro savi la negron. Lordo Mansfield mem konsultis aliaj juĝistojn, kaj senpartie aŭdis ĉiujn argumentojn de la advokatoj en proceso, kaj fine formale, esprimis la decidon, ke laŭ la leĝo de Anglujo sklaveco ne povas ekzistis en la lando. Oni tiel atingis la unuan ŝtupon : « Kiu spiras anglan aeron ne povas esti sklavo ». Nun eĉ pli grava ŝtupo restas atingota : la liberigo de ĉiuj sklavoj en la britaj kolonioj. Nu, la ekonomio de tiuj kolonioj en la Karibe maro ŝajne dependis de la rajto laborigi sklavojn en la plantejoj — almenaŭ tion oni kredis — aliaj Claphamanoj aniĝis al Granville Scharp por tiu batalo : la Claphama sekto, kiel oni nomis ilin? Kelkaj el la plej eminentaj persvadis William Pitt enkonduki la necesan leĝon en la Parlemento.

S-ro FOWLER.



ABONU

**ABONIGU VIAJN
AMIKOJN**

vidu la liston de perantoj
sur la lasta kovril-paĝo

GRAVAJ



DATREVENOJ


Antaŭ 175 jaroj mortis en Vieno.

Wolfgang Amadeus MOZART. — El ĉiuj komponistoj li estis tiu, kies universala genio malvolvis la muziken en ĉiuj ĝiaj formoj. Li jam estis admirata, kiel pianisto kaj komponisto en sia sesa jaro. Li estis nomita koncertestro en Salzburgo, kiam li estis nur 13 jara.



Antaŭ 175 jaroj naskiĝis en Pesaro (Italio)

Gioacchino ROSSINI. — En sia junaĝo Rossini jam estis konata opero-komponisto en sia lando. Tra Vieno kaj Londono li venis al Parizo, kie li estris la italan operon dum du jaroj. Liaj plej fame konataj operoj estas : « La Sevilana Barbiro », « Vilelmo Tell ». Per tiu lasta li fariĝis kreanto de la franca opero.



Antaŭ 125 jaroj naskiĝis en Hohenstein-Ernstthal.

Karl MAY. — Post malfeliĉaj junaj jaroj en multinfana familio, kies patro estis teksisto, Karl May malkovris sian talenton. Li unue verkis kelkajn prihistoriajn rakontojn sensukcesajn. Li poste verkis aventur-romanojn per kiuj li famiĝis ĉe la infanoj de pli ol 40 landoj.

VERKITA DE PANSTOVSKI

ESPERANTIGITA DE ROBERT MARTIN

Neĝo (1943) ⁽¹⁾

La maljuna Potapov mortis unu monaton, post kiam Tatiana Petrovna enloĝiĝis en lian domon, Tatiana Petrovna restis sola kun sia filino Varia kaj maljuna vartistino.

La dometo — tri ĉambroj entute — staris sur monto, super norda rivereto, tuj ekster malgranda urbo. Malantaŭ la domo, malantaŭ la senfoliaj arboj de la ĥardeno, blankis betularbareto. En ĝi, de mateno ĝis noktigo kriadis monedoj, kiuj svarme ĉirkaŭflugadis super la nudaj frondaroj kaj grakadis anoncante malbelan veteron.

Tatiana Petrovna longatempe ne povis post Moskvo kutimiĝi al tiu senviva urbeto, al ties domaĉoj kun iliaj knarantaj latispordetoj, kaj al la pezaj vesperoj, kiam oni povis aŭdi la kraketadon de la flamo en la petrola lampo.

« Kiel stulta mi estas ? — ofte pensis Tatiana Petrovna. — Kial do mi foriris el Moskvo, forlasis teatron, amikojn ! Mi estus devinta forkonduki Varian kaj vartistinon al Puŝkino, ĉar tie flugatakoj ne okazas, kaj mi mem estus restanta en Moskvo. Dio mia, kiel stulta mi estas ! »

Sed reveni al Moskvo ne plu estis farebla. Tatiana Petrovna decidis labori en soldathospitaloj — kelkaj ekzistis en la urbeto — tiel ŝi trankviliĝis.

Nun la urbeto eĉ komencis plaĉi al ŝi, ĉefe kiam alvenis vintro, kiu superŝutis ĉion per neĝo. Tagoj estis mildaj, grizkoloraj. Komence, la rivereto longatempe ne frostiĝis ; el ĝiaj verdaj akvoj eliris vaporoj.

Tatiana Petrovna iom post iom kutimiĝis al la urbeto kaj al la aliula dometo. Ŝi kutimiĝis al la misagordita horizontala piano, al sur la muroj flavigintaj fotoj, montrantaj plumpajn kirasŝipojn de la marborda defendo. Maljunulo Potapov iam estis ŝipmaŝinisto. Sur lia skribotablo kovrita per velkinta verda tuko staris eta kopio de krozŝipo « Gromoboj », sur kiu li navigadis. Oni ne permesis al Varia fuŝi tiun kopion. Cetere oni ne permesis al ŝi fingrumi ion ajn ĝenerale.

Tatiana Petrovna sciis, ke Potapov ankoraŭ havas unu filon, mariston, kiu nun troviĝis en la

floto de la Nigra Maro. Sur la tablo, apud la kopio de la krozŝipo, staris lia foto. Kelkafoje Tatiana Petrovna prenadis ĝin, rigardadis kaj, kuntirinte siajn delikatajn brovojn, pripensadis.

Sajnis al ŝi, ke ŝi ie jam renkontis lin, sed antaŭ tre longe, antaŭ sia malfeliĉa edziniĝo. Sed kie ? Kaj kiam ?

La maristo rigardadis ŝin per trankvilaj, iomete mokemaj okuloj, kvazaŭ li demandus : « Nu ! Ĉu vere vi ne povas memori, kie ni renkontiĝis ? »

— « Ne, mi ne memoras » — mallaŭte respondis Tatiana Petrovna.

— « Panjo, kun kiu vi babilas ? » ekkriis Varia el najbara ĉambro.

— « Kun la piano » ridetrespondis Tatiana Petrovna.

Meze de vintro, komencis alveni leteroj senditaj al Potapov, kaj ĉiuj estis skribitaj de la sama mano. Tatiana Petrovna metis ilin sur la skribotablon. Unu fojon, nokte, ŝi vekigiĝis. Neĝo feble brilis ĉe la fenestro. Sur la sofo, de temp'al tempo ŝpinadis la griza kato Arhip, kiu restis hejme post la morto de Potapov.

Tatiana Petrovna surmetis sian neglignon, eniris la kabineton de Potapov kaj staris ĉe la fenestro. El iu arbo silente elflugis birdo, skufaligante neĝon, kiu longatempe diŝutiĝis polve, pudrante la vitrojn.

Tatiana Petrovna lumigis kandelon sur la tablo, sidigiĝis en la fotelon kaj longe rigardadis la langon de fajro, kiu eĉ ne tremetis. Poste, ŝi delikate prenis unu el la leteroj, malfermis ĝin kaj malantaŭen rigardinte, ŝi komencis legi.

« Mia kara patro » legis Tatiana Petrovna, « jen de unu monato mi estas en hospitalo. Mia vundo ne estas tre danga. Kaj entute ĝi cikatriĝas. Pro Dio, ne emociiĝu ! Kaj ne fumu cigaredon post cigaredo, mi petas vin ! Mi ofte pensas pri vi, Paĉjo » daŭre legis Tatiana Petrovna, « kaj

pri nia domo, kaj pri nia urbeto. Ĉio estas tiel strange malproksima, kvazaŭ je la limo de la mondo. Mi fermas miajn okulojn kaj tiam mi vidas : mi malfermas la latispordeton, mi eniras en la ĝardenon. Vintro, neĝo, sed la eta aleo al maljuna laŭbo super la ravino estas senneĝigita, kaj la siringarbetoj kovritaj de prujno. En ĉambroj kraketadas fornoj. Oni flaras betulan fumon. La piano, fine, estas agordita kaj en kandelinojn vi metos spiralfarmajn flavajn kandelojn — ĉi tiujn mi alportis el Leningrad. Kaj la muzikaĵo, kiu kuŝas sur la piano estas la uverturo de « Pika Damo » kaj la romano « Por la bordoj de la malproksima patrolando ». Ĉu la sonorilo funkcias ĉe la pordo ? Ĉiaokaze mi ne sukcesis ripari ĝin. Ĉu vere mi denove vidos ĉion ? Ĉu vere mi denove vidos ĉion ? Ĉu vere mi denove lavos min, post mia alveno, per mia puta akvo el nia kruĉo ? Vi memoras ? Ahah ! se vi sciis, kiel mi ekamis ĉion hejman de tie-ĉi, de malproksime ! Ne miru, sed mi parolas al vi tre serioze : mi memoris ĝin en la plej teruraj minutoj de batalo. — Mi konsciis, ke mi defendas ne nur la tutan landon, sed ankaŭ tiun malgrandan kaj por mi plej karan angulon, vin mem, kaj nian ĝardenon, kaj niajn hartufajn knabetojn, kaj la betulajn arbaretojn malantaŭ la rivero, kaj eĉ nian katon Arhip. Ne ridu, mi petas vin, kaj ne balancu vian kapon ! Eble, kiam mi eliros el hospitalo, mi estos sendita hejmen dum mallonga tempo. Mi ne scias. Sed estas pli bone, ke vi ne atendu min ».

★★

Tatiana Petrovna longe sidis ĉe la tablo, rigardis, per larĝe malfermitaj okuloj tra la fenestro, tien, kie meze de densa malhela lazuro, ektagiĝis, kaj ŝi pensis, ke hodiaŭ aŭ morgaŭ, nekonata viro povas alveni el fronto al tiu domo kaj renkonti ĉi-tie fremdulojn afliktoj lin kaj ankaŭ kiam li vidos ĉion tute ne tiel, kiel li estus deziranta vidi.

Matene, Tatiana Petrovna ordonis al Varia, ke ŝi prenu lignan ŝovelilon kaj senneĝigu la aleon al la laŭbo super la ravino. La laŭbo estis tute kaduka. Ĝiaj lignaj kolonetoj griziĝis, kaj sur ili kreskis likenoj. Tatiana Petrovna mem riparis la sonorilon super la pordo. Sur tiu sonorilo estis muldita amuza surskribo : « Mi pendas ĉe pordoj-sonoru la ĝoj' ! ».

Tatiana Petrovna frapetis la sonorilon. Ĝi komencis tinti kvazaŭ kapvoĉe. La kato Arhip malkontente akriĝis siajn orelojn, ofendiĝis kaj foriris el la vestiblo : la ĝoja sono de la sonorilo ŝajnas al ĝi, evidente, impertinenta.

Dum la tago, Tatiana Petrovna, skarlata kaj agitiĝanta, kun okuloj malklarigitaj pro emocio, vokis el urbo maljunan agordiston, iun rusiĝintan Ĉehon, kies okupado estis riparado de primusoj, kerosenaj varmigiloj, pupoj, akordiono kaj misagorditaj pianoj. Lia nomo estis tre komika : sinjoro Kuriozaĵo. Tiu Ĉeho, agordinte la pianon diris, ke la piano estas maljuna sed tre bona. Tatiana Petrovna ja sciis tion sen lia aserto.

Kiam li foriris, Tatiana Petrovna atente pri-rigardis ĉiujn tirkestojn de la skribotablo kaj trovis paketon da spiralfarmaj dikaj kandeloj. Ŝi enmetis ilin en la pianajn kandelinojn. Vespere ŝi lumigis la kandelojn, sidigiĝis ĉe la pianon kaj la domo plenumiĝis je sonorado.

Kiam Tatiana Petrovna ĉesis ludi kaj mal-lumigis la kandelojn, la ĉambroj odoris je mildodora fumo, kiel ĉe la Kristnaska pinarbo. Varia ne povis plu elteni.

— « Kial vi fingrumas aliulajn aĵojn ? » Si diris al Tatiana Petrovna. « Vi ne permesas al mi, sed vi mem fingrumas ? kaj la sonorilon, la kandelojn kaj la pianon kaj ĉion vi fingrumas. Kaj aliulan muzikaĵon sur la pianon vi metis ».

— « Ĉar mi estas maturaĝa », respondis Tatiana Petrovna. Varia, kuntirinte siajn brovojn, dubeme rigardis ŝin. Tatiana Petrovna je tiu minuto neniel aspektis matura. Ŝia tuta persono kvazaŭ brilis kaj ŝi estis plej simila al tiu blondhara junulino, kiu perdis sian menuveran ŝuon (*) en iu palaco. Tatiana Petrovna mem iam rakontis al Varia pri tiu junulino.

(Daŭrigota)

(*) Fakte, Pantovskij erare skribis « kristelan ŝuon » ĉar francelingve « verre » (vitro) kaj « vair » (menuvero, griza kaj blanka pelt) estas prononcataj same, t.e. « ver ». Eble Pantovskij tiun rakonton per rusa traduko el la franca lingvo.

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

Vi povis rimarki ke la lasta numero de KULTURAJ KAJEROJ ne entenis la kutimajn problemojn de nia konkurso. Tion ni faris tute intence, ĉar ni deziris, ke la tuta numero estu nia omaĝo al la memoro de Henri Micard.

Do, hodiaŭ vi trovos ĉi-sube duoblan konkurson. Vi devos respondi la kvar problemojn kaj ni petas vin, ke vi sendu viajn respondojn antaŭ la fino de Marto. Kaj nun : « Bonan kuraĝon ! ».

Unua problemo. — En la ĉi-suba rakonteto kuŝas kelkaj eraroj (gramatikaj) kiujn vi devas korekti. Estos kalkulitaj po-2 poentoj por ĉiu eraro ĝuste korektita, sed estos forprenita po-1 poento por ĉiu eraro aldonita.

Suda rakonto

Mia estro devas aĉeti ĉiujaron kvin barelojn de inko nur pro la punktoj, komojn, kaj similajn signojn en la korespondado de nia firmo.

— Tiuj signifas nenio! Mia estro ŝparas ĉiujaron ok barelojn de inko nur pro la forlasado da tiujn signojn en la korespondado.

Dua problemo. — En la ĉi-subaj grupoj de vortoj kelkaj estas malkorektaj (fakte ili ne ekzistas en Esperanto). Bonvolu ilin substreki aŭ speciale noti. Estos kalkulitaj po-2 poentoj por ĉiu barbarismo ĝuste eltrovita; sed estos forprenita po-1 poento por ĉiu barbarismo kreita de vi.

TAVOLO - STALO - REKO - JUGO - DOĜO - KRUCO - PAFI - MELO - PANEJO - TAVELO - STALO - NEKO - JUĜO - DOKO - KRUCO - PAGI - MELONO - PANELO - JAVELO - STIPI - CEKO - JOJO - DOGO - KROPO - PAĜIO - MEJLO - PANARO - JUVELO - ŜTIPI - ĈEKO - JODO - DOJO - KROTO - PAJO - MEJO - PAPAVO

Tria problemo. — En la ĉi-suba teksto vi devas anstataŭ la punktojn per la taŭgaj vortoj. Estos kalkulitaj po-2 poentoj por ĉiu vorto ĝuste trovita, sed estos forprenita po-1 poento por ĉiu vorto malĝuste elektita.

Inspektoro ekzamenis klason ... la Biblio, kaj deziris trovi, kion la infanoj sciis pri Abŝalom.

Ili estis tre malkleraj, kaj ne respondis al ... demandoj. Fine li demandis :

— Kion havis Abŝalom, ... pli granda grado ... aliaj ?

Li respondis,

La inspektoro, kiu estis iom ..., fingromontris al ... kapo.

— Pensu, — li diris, — li havis ..., mi preskaŭ ne havas. Kio ĝi estas ?

Li respondis : — Cerbo !

Kvara problemo :

VORTPLEKTAJO

1 KARATO	5 ATENCO	9 ENKETO	13 ESPERI
2 RIMEDO	6 ARESTI	10 ASPIDO	14 KOLORO
3 HEPATO	7 ADORAS	11 KATENO	15 SABATO
4 CERIZO	8 POKALO	12 ORANĜO	16 PIRATO

Tra la supre videblaj 16 vortoj iras unu proverbo, kiu konsistas el 32 literoj. La unua litero de la proverbo estas en la unua vorto, ĝia dua litero en la dua vorto, kaj tiel plu ĝis ĝia 16-a litero, kiu estas en la 16-a vorto. En tiu vorto la proverbo turnas sin kaj komencas reiri tra la samaj vortoj ĝis la unua vorto, tiel, ke ĝia 17-a litero estas en la 16-a vorto, ĝia 18-a litero en la 15-a vorto k.t.p., kaj fine ĝia 32-a kaj lasta litero troviĝas en la unua vorto.

La literoj 1—16 de la proverbo estas troveblaj en la antaŭaj duonoj de la vortoj, la literoj 17—32 en la malantaŭaj duonoj de la vortoj.

AMUZAJ PROBLEMOJ

(Apartaj de la konkurso)

Solvaj de la antaŭaj problemoj :

La rompita bambuo. — Estu « x » la alto AB serĉata; estu « a » la longo BC de la supra parto de la bambuo. Ni povas skribi :

$$x + a = 10 \text{ futoj}$$

En la ortangula triangulo ABC la teoremo de Pitagoro permesas skribi : $a^2 = x^2 + 9$ aŭ $a^2 - x^2 = 9$

Do, $(a+x)(a-x) = 9$; ĉar $a + x = 10$ f. ni

$$\text{diros : } a - x = \frac{9}{10}$$

$$2x = 10 - \frac{9}{10} = \frac{100 - 9}{10} = \frac{91}{10}$$

$$x = \frac{91}{20} = 4,55; \text{ la alto AB estas } = 4,55 \text{ futoj}$$

La faskoj de asparagoj. — La longo de la dua cirkonferenco estas duobla de la unua. Do la radio de la dua cirklo estas duobla de la unua.

$$C = 2 \times 3.14/16; C' = 2 \times 3.14/16 R'; R' = 2 R$$

$$C' = 4 \times 3.14/16 R = 2 \times 3.14/16 (2R)$$

La surfaco de la dua cirklo estas proporcia je la kvadrato de la radio :

$$SC = 3.14/16 R^2; SC' = 3.14/16 R'^2; R' = 2R$$

$$SC' = 3.14/16 (2R)^2 = 4 \times 3.14/16 R^2 = 4 SC$$

La surfaco de la dua cirklo estas la kvaroblo de la unua. Do la kvanto da asparagoj estas kvarobla, kiam oni uzas la dua ŝnureto. La propono pagi duoblan prezon ne konvenas.


NOVA PROBLEMO

(Sro Salasc)

Horizontale. — 1. Li ne estas bona. — 2. Grasa fluaĵo (r); Kemiaĵo por lavi. — 3. Hejma senceremonia vesto (r); sekita moruo (r). — 4. Persona pronomo; kromsigno sur partituro. — 5. Masivo aŭ ĉeno. — 6. Sinsekvo da samfamiliaj regnestroj. — 7. Poseda adjektivo; amata (r.). — 8. Sufikso (r); birdeto (r). — 9. Kurbline angulo; malgranda papilio (r.). — 10. Densigita ok-sigeno; sento de kredanto (r.).

Vertikale. — A. Speco de frenezeto. — B. Ilo de ŝuisto; ĝi utilas por ŝirmi objekton. — C. Meritanta esti legata; teknika sufikso. — D. Montra adjektivo (r); li havas nepon. — E. Rezino; sufikso. — F. De blanka kristalo. — G. Verba finaĵo; dip-tero (r). — H. Asocio; prezaro (r). — I. Fermata kurblinejo (r); moka dirmaniero (r). — J. Ĝi impresas flarsenton; preparita felo (r).

(r) signifas ke la vortoj konsistas nur el radikoj).



GRAMATIKO PER BONHUMORO

« **IND** esprimas, ke io aŭ iu prezentas sufiĉajn kondiĉojn, por ke oni direktu al ĝi aŭ al li la agon esprimitan de la radiko.

OT esprimas ideon de estonteco. Sed ĉar la ideo pri devigo ofte konfuziĝas kun tiu de estonteco, **OT** kelkafoje esprimas ankaŭ tiun ideon.

END esprimas ideon de nepra devigo ».



— Ĉu vi ne opinias, ke mia patrino estas vere aminda virino?



— Ŝajnas, ke ŝi pensas pri la naskotaj idoj, ĉu ne?



— La duŝo-ŝprucilo fariĝas pli kaj pli riparenda.


21 jul. - 3 aŭt. VEA-semin.
3-10 aŭt. Madrid 10-17 Saraguso?

16-23 aŭt. SELO dix
→ 7 sept. Toulon

Pureski
25 kole Somme
Pauze

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (39 aŭst. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (70 fr.).
Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (12 ŝil.).
Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczy, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (1,50 us. dol.).
Finnlando : S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk : Tu 60253 (7 mk.).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33, - pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (5,6 mk.).
Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^o, la, BARCELONO 90 pes.).
Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (840 lir.).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtako 239 (1260 d.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (5 guld.).
Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg. 56, LAMBERTSEDER (10 kr.).
Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (50 zl.).
Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk. 157007 (8,4 kr.).
Svislando : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).
Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (1,50 us. dol.).
Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (1,50 dol.).
Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncintajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje lertempi ;
- Por ekskursi tra cent-rokcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupon al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo